

ISSN: 0827-3154


Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2008/1

printempo/somero 2008

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

LUMO



U. Paul Ronald (1925 – 2008)

Kunfondinto de la postmilita Kanada Esperanto-Asocio
Estrarano, Sekretario kaj Prezidanto (1972-1976) de Kanada Esperanto-Asocio

Lumon eldonas dufoje en jaro KEA, 6358-A rue de Bordeau, Montréal (QC) Kanado H2G 2R8

Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association

Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Plej freŝaj informoj pri TAKE 7 (psh).....	3
Librofoiro 2006 (B. Williamson)	4
Dua vivo (R. Porter)	5
Nova Eo-Klubo en Nov-Skotio (K. Keeble)	6
Fina venko? (R. Porter)	7
Tri raportoj pri Esperanto (L. Matheson)	8
Impresoj pri la 9-a Meksika Landa Kongreso en Aguascalientes (M. Sveda).....	9
Forpasis Paul Ronald (Z. Metz)	10
Kanadaj Zamenhof-festoj 2007 :	
Kalgario (psh).....	12
Toronto (K. Price).....	12
Universala Kongreso en Florenco; raporto de unuafoja kongresinto (R. Porter)	13
La Unua Libro en dua jarcento (G. Keyes).....	14
La leono kaj la kokino (anonima).....	14
Testu vian vortstokon (S. Norvell)	15
Malfrua ĉe la laborejo (anonima)	15
Ubuntu (R. Porter).....	16
Google nun serĉas Esperante (M. Blahus).....	17
Vikipedio: Volapük superas Esperanton, ĉu? (S. Auclair).....	17
Klaku.net : valora aldono al la Esperanta retejaro (B-A Legault).....	18
Mi estas neniu (poemo de E. Dickinson, tradukis S. Norvell)	18
Redaktora angulo	18
Abonu al Monato, La Ondo de Esperanto	19
Kalendaro de kanadaj Esperanto-eventoj	20

Eldonkvanto de ĉi tiu numero : 200

Redaktis : Paul Hopkins

Provlegis : Yves Bellefeuille, Ken Price, Allan Simon, Bob Williamson

Presis kaj distribuis : Yves Bellefeuille

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligas plibonigon de la revuo. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.

SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2008, BV. FARI TION NUN!

Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por \$25 al

Kanada Esperanto-Asocio

p/a Yves Bellefeuille, kasisto

2372 Haddington, Ottawa (ON) K1H 8J4



La 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto baldaŭ ekos. Ĉu ni vidos **vin** en Montrealo?

Nombro de aliĝintoj

Ĝis la 29-a de junio aliĝis **204** homoj: **71** el Kanado (Alberto 6, Brita Kolumbio 2, Kebekio 43, Ontario 15, Nov-Skotio 3, aliaj provincoj 2), **76** el Usono (21 ŝtatoj), **18** el Eŭropo, **14** el Kubo, **10** el Meksiko, **4** el Suda kaj Centra Ameriko, kaj **11** el aliaj landoj.

Bankedo

Ĝis la fino de aprilo jam vendiĝis ĉiuj 80 lokoj antaŭviditaj por la bankedo, **sed** anoncis sin tiom da personoj dezirantaj partopreni ke finfine oni decidis ŝanĝi la bankedejon por akcepti pli da homoj. (Uzu la aliĝilon ĉe <http://www.take7.ca/aligxo.html>). Post la manĝo okazos aŭkcio de malfacile troveblaj esperantaĵoj profite al la Amerika Fondaĵo de UEA. Post tio aŭdiĝos la multlingva koncerto de JoMo. Dancemuloj povos danci dumkoncerte. Nepre kunbankedu kun ni!

Programo

Super-kongresemuloj povas ekkongresumi per kvar-taga antaŭkongresa ekskurso al Kebeko, sed por aliaj la programo ekos la 11-an de julio per posttagmeza turisma gvidado tra Montrealo kaj bonveniga vespero. La sabatan matenon okazos la oficiala kongresa malfermo, dum kiu vin bonvenigos la Amerika Komisiono de UEA, Kanada Esperanto-Asocio, kaj Esperanto-USA.

Dum la resto de la semajno okazos amuz-vesperoj, debatoj, ekskursoj, ekzamenoj, jar-kunvenoj, kursoj, prelegoj, ktp. Vidu la paĝon <http://www.take7.ca/programo.html> por pli detalaj informoj. La oficiala fermo de TAKE 7 okazos matene de vendredo, la 18-a de julio.

Specialaj gastoj

Dum la kongreso oni povos renkonti plurajn gastojn aparte invititaj:

- **Jean-Marc Leclercq (JoMo)**, Francio
- **Maritza Gutierrez González**, Kubo
- **Atilio Orellana Rojas**, Argentino/Nederlando
- **José Antonio Vergara**, Ĉilio
- **Hori Yasuo**, Japanio
- **Julián Hernández Angulo**, Kubo
- **Rubén Ortiz Hernández**, Gvatemalio
- **Humphrey Tonkin**, Usono
- **Mark Fettes**, Kanado

Legu pri iliaj meritoj ĉe:

<http://www.take7.ca/gastoj.html>

Kursoj por komencantoj

Informu viajn amikojn kaj partnerojn, ke dum TAKE 7 estos baza kurso por komencantoj. La semajna kotizo al TAKE 7 inkluzivas partoprenon al la kurso, do ne necesos ajna krompago.

Kongresejo

La kongresejo de TAKE 7 estos la konstruaĵo «DeSève» de la Kebekia Universitato en Montrealo (UQAM). La universitato lokiĝas meze de la kultura centro de Montrealo, kiun ĉirkaŭas diversaj vizitindaj kvartaloj.

ATENTU KANADANOJ !

Dum TAKE estos unuloke pli da kanadaj esperantistoj ol iam antaŭe dum la pasintaj 20 jaroj. Kanada Esperanto-Asocio okazigas do kunvenon dimanĉon la 13-an de julio ekde la 16-a horo (4-a horo ptm) por diskuti aferojn de KEA kaj la kanada Esperanto-movado. Ĉiuj kanadanoj estos tre bonvenaj ĉeesti la kunvenon; nepre notu en via horaro!

Librofoiro 2006

(el *Inter Ni* n-ro 246, oktobro 2006)

[Sekvas raporto pri ekzemplo-dona informa agado. Eble Esperanto-grupoj en aliaj urboj – Bob ja mencias plurajn urbojn kie okazis librofoiroj en 2006 – povus simile agi... kaj havi simile bonan sukceson ! (psh)]

Dum la pasintaj 12 jaroj, libro-amantoj pasigis la lastan dimanĉon de septembro ĉeestante librofoiron en Halifakso, unu el kelkaj urboj en Kanado (ĉi-jare en Halifakso, Kitchener, Toronto, Kalgario kaj Vankuvero). „The Word on the Street” („La Vorto sur la strato”, mult-signifa esprimo en la angla) vere troviĝis meze de mezurba strato dum la unuaj jaroj en Halifakso, sed post pli ol unu pluvema dimanĉo sub tendoj kaj en apudaj butikaroj, la organizantoj trovis novajn lokojn en kajaj konstruaĵoj apud la haveno. Ĉi-jare, la foiro troviĝis en la nova, pli luksa kaja Ekspoziciejo de Cunard, nomita laŭ Samuel Cunard (1787-1865), sukcesa komercisto el Halifakso kiu famiĝis pro siaj pasaĝerŝipoj transatlantikaj. Por la sepa sinsekva jaro, ankaŭ la loka esperantistaro partoprenis ĉe la libro-foiro kun inform-tablo.

Kion oni supozeble povas vidi kaj sperti ĉe libro-foiro? Krom libroj ĉiaj kaj ĉie, oni kutime ĉeestas „Vorton sur la strato” por renkonti kaj aŭskulti multajn, plejparte lokajn verkistojn, trafoliumi la eldonaĵojn de lokaj eldonistoj, trovi bonaĉetaĵojn, kaj ekscii pri diversaj kulturaj agadoj kiuj rilatas al libroj kaj legado.

En tiu ĉi lasta kampo troviĝis ankaŭ la Esperanto-budo. Sur nia tablo estis ekzempleroj de diverstemaj esperantlingvaj libroj el la loka Libraro Ludovika por allogi la atenton de ĉiaj homoj. Oni povis vidi ekzemplerojn de *Winnie-la-Pu*, *Asterikso*, *Tinĉjo*, *La eta princo*, *La du turoj* de Tolkien, la *Sonetoj* de Ŝekspiro, la *Sankta Biblio*, poemaroj de William Auld, Kolomano Kalocsay kaj Eli Urbanová, kelkaj Krestomatioj, *PIV* kaj aliaj vortaroj, kaj diversaj aliaj libroj kaj gazetoj. Sur mureto videblis bildkartoj de multaj Universalaj Kongresoj, kaj kovertoj el foraj landoj. Kim Keeble montris sian kolektaĵon de fotoj pri esperantistoj en sia vivo. La sola libro aĉetebla ĉe ni estis *Esperanto en la moderna mondo*. Aliflanke de la ĉambrego troviĝis budo pri la gazeto *Walrus*, kaj oni afable donis ekzempleron de la plej lastatempa numero kun tiu longa artikolo pri Esperanto por montri al niaj vizitantoj. Estis ankaŭ multaj informiloj kaj broŝuroj por disdoni.



Kim Keeble kaj Steĉjo Norvell malantaŭ nia ekspozicia tablo.

Kion ni esperis atingi? Nia celo estis informadi pri la internacia lingvo al homoj, kiuj jam interesiĝas pri libroj, kaj varbi ĉiun interesiton. Kutime ni atendis preterpasantojn kaj paroligis ilin kiam ni povis, ofte per la demando, „Ĉu vi jam scias pri Esperanto, la internacia lingvo?”

De tempo al tempo, homo neniam antaŭe aŭdis pri ĝi, sed plejparte oni rekonis la nomon aŭ la ideon, eĉ pro la fakto ke ili memoris nin de pasinta jaro. Iuokaze, ni povis denove aŭ por la unua fojo doni informon pri la bona lingvo. Kion oni kutime pensas pri ni? Kompreneble ekzistas unu-du kontraŭuloj, sed plejparte ni havas kaj faras amikojn. Kelkaj eĉ ekinteresiĝis kaj forprenis ekzempleron de la unua leciono de 12-leciona perpoŝta kurso. Ĉi-jare, Kim Keeble jam ricevis kvar plenigitajn unuajn lecionojn dum la unua semajno post la foiro. Tio ŝajnas nia plej bona rezulto ĝis nun, kaj ni esperas povi gajni novajn grupanojn. Sed eble ni nur vekis latentan intereson, kiu esprimiĝos post jaroj. Oni neniam povas esti certa pri tio.

Kiel antaŭe, nia eta grupo pagis entute 186 dolarojn por ĉeesti la 6-horan ekspozicion. Tio estas nia ĉefa ĉiu-jara publika inform-agado por krei esperantistojn.

Ni renkontis multajn homojn, kaj ni semis. Ni semas kaj semas...

— Bob Williamson

Dua Vivo

(el *Inter Ni* n-ro 258, oktobro 2007)

Esperanta lando jam ekzistas – en kyberspaco. Pli ol 250 loĝantoj aliĝis al la lando. Ni kunvenas kaj babilas voĉe kaj per tajpado. Tiu lando estas tridimensi-aspekta lokaĵo kun plantoj kaj konstruaĵoj kie avataroj kunsidas. Por viziti, oni devas unue aliĝi al „Second Life” (Dua Vivo), kreaĵo de Linden Labs. Aliĝo al tiu virtuala mondo estas senkosta. Due, oni devas konstrui avataron – ekranan personon (aŭ beston) kun korpo, vestoj (eble), eble flugiloj, aŭ kiujn ajn formon kaj kolorojn vi deziras. Kompreneble la esperantistoj en DV estas multe pli belaj ol tiuj en la unua vivo. En DV iliaj genoj ne kreas ilin, sed iliaj imagoj faras iliajn aspektojn. Trie oni teleportas sin (ekvojaĝas per unu klavara puŝo) al Esperanto-Lando, kiu estas kreaĵo de Erick Nykvist. Li pagas al Linden Labs por la lokaĵo (servila spaco) kaj metis konstruaĵojn, seĝojn, ktp por siaj gastoj. Li helpis min kaj aliajn komencantojn kun niaj vestaj kaj komunikaj problemoj.

Dimanĉe je la 19-a horo universala tempo (aŭ 11-a horo je DV-tempo, kiu egalas pacifikan horzonon), esperantistoj el la tuta mondo kunsidas. Lastfoje estis dek avataroj kun animoj en Kanado, Kalifornio kaj Teksaso en Usono, Danlando, Japanio, Brazilo, Barato, kaj Germanio. Ni diskutis lingvojn, vojaĝadon, komputilojn, librojn, politikon, etnajn kaj naciajn diferencojn, religion, la nekredeblan G. Bush – la kutima Esperanta konversacio. Intertempe, en la frua vespero unu persono aŭ du hazarde vizitis la landon. En frua oktobro ĉijare la unua Universala Kongreso en DV okazis. Renato Corsetti kaj aliaj eminentuloj prelegis.

Kursojn por lerni Esperanton DV ofertas. Ne antaŭvideblas kiom pli longe niaj korpoj en la UV (unua vivo) devas fizike vojaĝi. La seĝo antaŭ la komputilo tre komfortas.

Por informo pri DV en la Esperanta lingvo, vizitu:

<http://www.freewebs.com/duavivo/index.htm>

Por informo pri DV kaj aliĝilo en la angla lingvo: <http://secondlife.com/>

— Reni Porter

Nova Eo-Klubo en Nov-Skotio

(el *Inter Ni* n-ro 265, majo 2008)

Dum preskaŭ tri jaroj mi ne instruis Esperanton en lernejo, sed nuntempe mi gvidas Esperantan Klubon en Lernejo Cavalier Drive. Tiu sufiĉe granda lernejo situas en Lower Sackville, antaŭurbo de Halifaxo, la ĉefurbo de Nov-Skotio.

Unue, permesu al mi rakonti pri la naskiĝo de tiu klubo. Antaŭ du jaroj Johano Green aniĝis al nia eta Grupo. Li estas mem-lerninta komencanto kiu kredas ke Esperanto estas bona lingvo kaj ege taŭga por internacia interkompreno kaj komunikado. Li loĝas en Lower Sackville kun sia edzino kaj tri gefiloj. Nia grupo estis lia unua renkonto kun esperantistoj. Unufoje li demandis al mi, ĉu mi volas instrui Esperanton al infanoj en lernejo. Mi jesis, kaj ni parolis iomete pri tiu afero. Tamen mi avertis lin, ke ne estas facile interesigi edukajn instancojn pri Esperanto.

Dum frua oktobro pasintjare, hazarde tri amikinoj el Japanio vizitis nin – Chizuko Nishi, mia plumamikino, kune kun sia filino, Yoko, kaj kun Tomoko Yamane, amikino de Yoko. Dufoje antaŭe Chizuko kaj Yoko vizitis nin, kaj ni ĉiam ĝuis ilin ĉar ili estas afablaj kaj amikaj virinoj. Yoko (kiu ludas orkestran kornon) kaj Tomoko (kiu ludas violonon) estas muzikistoj, kiuj ludas en simfonia orkestro en Osaka, Japanio. Chizuko kaj mi estas preskaŭ kiel fratinoj ĉar ni korespondis Esperante dum pli ol dudek jaroj, unue per paperaj leteroj kaj nuntempe plejparte retpoŝte. La muzikistinoj bone distris nian grupon per koncerteto ĉe posttagmeza kunveno dum la vizito, sed Johano ne povis ĉeesti la kunvenon, do mi sugestis ke li kaj la gefiloj vizitu nin poste. Li jesis kaj Johano, James, Joseph, kaj Janelle venis tiun vesperon. La geinfanoj tre plaĉis al niaj japanaj vizitantoj kaj reciproke. Fakte, Yoko

kaj Tomoko afable permesis ke la geknaboj provu ludi iliajn instrumentojn, kaj eĉ iomete instruis la infanojn. Ni ĉiuj multe ridis kiam ili faris tion, ĉar tiam ni aŭdis multe da bruo, sed bedaŭrinde, malmulte da vera muziko.

Poste, Johano parolis kelkfoje kun Don Rearden, la lernejestro de Lernejo Cavalier Drive, kie studas la tri gefiloj de Johano, pri la valoro de Esperanto kiel pontlingvo en la lernado de fremdaj lingvoj. Li fine aranĝis renkontiĝon por mi kun Don. Mi klarigis al li ke mi deziras fari prezentadon pri Esperanto al la junaj lernantoj el la 3-a ĝis la 6-a klasoj kaj al iliaj instruistoj, kun la celo iniciati Esperanto-Klubon. Li konsentis, do Johano kaj mi kunvenis kun Don la 4-an de januaro 2008, kaj ni faris prezentadon en la gimnastikejo. La sekvan vendredon, la klubo kunvenis en la lerneja biblioteko, kaj Johano, la lernejestro kaj kelkaj geinstruistoj rigardis kiam mi prezentis Esperanto-lecionon. Kvardek lernantoj aliĝis al la klubo sed, kompreneble, ne ĉiuj ĉeestis tiun kunvenon. Ekde tiam, ni kunvenis ĉiun vendredon dum la lunĉohoro, kaj tio signifas ke mi instruas dum malpli ol 45 minutoj ĉiun kunvenon. Mi utiligas la kurson „Dek Demandoj” kiel lernilon. Mi ankaŭ montris unufoje la unuan lecionon de „Mazi” al la klubanoj. Ili ĝuis la videon, eĉ se ili ne povis bone kompreni la paroladon. Nun restas nur 17 klubanoj, sed ili vere volas lerni kaj uzi Esperanton. Ili bone kantas Esperantajn kantojn, ludas „Dek”, skribas kaj, kompreneble, parolas Esperanton en la nova klubo.

Katalin Kováts sugestis al mi, ke ŝi faru anoncon pri la nova klubo en la retpaĝo de <edukado.net>. Pro tio, ĝis la fino de aprilo, ni ricevis 22 belajn poŝtkartojn el Finnlando, Svedio, Britio, Germanio, Nederlando, Aŭstrio, Francio, Hispanio, Ĉeĥio, Norvegio, Brazilo, Japanio, Portugalio, Meksiko, kaj Kanado. Ni sendis dankkartojn al tiuj, kiuj

skribis iliajn adresojn sur la kartoj, kaj la ricevitaĵojn ni metis en belan liberfolian kajeron tiel ke oni povas vidi la du flankojn de ĉiu karto kaj anglan tradukadon de la skribita esperantlingva mesaĝo. La Klubo donace ricevis de Steĉjo Norvell 35 ekzemplerojn de la mirinda bildvortaro por komencantoj *Poŝamiko*. La klubanoj kaj mi sincere dankas Steĉjo-n pro tiuj belaj kaj utilaj libretoj. Mi donos unu ekzempleron al ĉiu klubano kaj la ceterajn ni vendos por gajni

monon, kiun ni utiligas por aĉeti poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn, ĉar ili volas korespondi kun aliaj Esperantaj klasoj.

Tio, mi esperas, ne estas la fino de mia rakonto ĉar mi esperas ke la klubo daŭros. Mi estas nun kontenta, ĉar mi povas denove ĝui la sperton instrui nian karan lingvon al geknaboj.

— Kim Keeble



Fina venko?

(el *Inter Ni* n-ro 249, januaro 2007)

[Ĉi tiu lingvofilozofia artikolo estiĝis reage al artikolo de « Francisko » en la numero de *Inter Ni* aperinta en septembro 2006. (psh)]

La grandaj fiŝoj manĝas la etajn fiŝojn. Tio ankaŭ okazas pri lingvoj. Sed tio ne estas ĉiam malbona por la individuoj. Ĉe la orienta marbordo de Kanado vivas proksimume ok mil parolantoj de la indiĝena mikmaka lingvo. Ok mil parolantoj ne sufiĉas por krei literaturon, gazetojn, kaj filmojn, por havi universitaton, sciencajn terminarojn kaj ĉion de la intelekta vivo. Se oni vivas en tiu eta kulturo, tia grupo riĉigos la mondon, sed paradokse tia individua intelekta vivo estas relative malriĉa. Pro tiu kaj aliaj kialoj, la anoj de etaj lingvoj foriras al riĉaj kulturoj kaj lingvoj. Inter la 6000 aŭ 7000 lingvoj en la nuna mondo estas nur centoj, kiuj havas sufiĉe riĉan kulturon por reteni membrojn. La aliaj miloj da lingvoj preskaŭ certe malaperos.

Kiam la mondo havos nur centon da grandaj, kulture riĉaj lingvoj, ĉu tio estos ekvilibrata stato aŭ ĉu finfine nur unu granda fiŝo naĝos en la maro? Mi ne scias. En la historio, la punta lingvo estis tio de la plej potenca etna grupo. Nun la ekonomia povo kaj la milita

povo de Usono malfortiĝas. La usona jara deficito de la ŝtata buĝeto kaj la internacia komerca deficito kunmetitaj estas pli ol sep procentoj. La Internacia Mona Fonduso ne daŭrigas monoprunton por pli etaj landoj kiam ili havas kvin-procentan deficiton. La tendenco (relative) estas suben. En orienta Azio la mandarena lingvo kreskas, kaj en la mezo de Eŭropo la uzado de la germana kreskas. En partoj de Afriko, la svahila estas punta lingvo. Intertempe, eble la mondo havos regionajn pontajn lingvojn.

Scienca fikcio iam iĝas scienca fakto, sed malofte. La estroj de Google opinias ke ili konstruos universalan tradukilon – ĉefe per grandega komputila povo. Se tio okazos, eble la enorela tradukilo (kiel je “Star Trek”) sekvos. Alia sciencfikcia ideo estas „the Singularity” (ĉu “la unueciĝo” – red.). Tio estas la punkto kiam la komputiloj aŭ komputilaroj komencas lerni kaj krei memvole sen helpo aŭ interveno de homaro. Je tiu punkto, la plej altaj kaj fortaj vivoformoj sur la tero estos silicanoj, ne karbonanoj. Tiam ni parolos la lingvon, kiu plaĉas al niaj novaj mastroj: „01 0110 100”.

— Re-ni POR-TERO

Fina Venko?

Tri Raportoj pri Esperanto

(el *Inter Ni* n-ro 247, novembro 2006)

[Informante la publikon pri Esperanto, estas grave scii pri favoraj raportoj en prestiĝaj amas-komunikoj kie eblaj interesitoj povas havigi al si « objektivajn » informojn pri nia lingvo kaj kulturo. Sekve, kvankam temas sube pri raportoj aperintaj en 2006, gravas informiĝi pri ili ... kaj atentigi aliajn pri ili. (psh)]

Estas interese noti ke lastatempe aperis tri favoraj anglalingvaj raportoj pri Esperanto. Unue aperis „A Visit to Esperantoland” de Arika Okrent, en la revuo *American Scholar* (Vintro 2006, 75(1), p. 93-108). Je la 18-a de julio [2006] okazis intervjuo de Humphrey Tonkin dum la radiofona programo “The Sunday Edition”. En septembro [2006] aperis en la revuo *The Walrus* „Tongues of the World, Unite!” de Alison Gillmor.

American Scholar estas longe ekzistanta, erudicia revuo el Washington, D.C. *The Walrus*, kiu aperas ekde 2003, estas pli nova kanada revuo, kiu celas publikan diskutadon pri gravaj sociaj aferoj, kaj naciaj kaj internaciaj. „The Sunday Edition” estas nacie dissendita programo pri naciaj kaj internaciaj aktualaĵoj. Ĉiuj estas respektataj fontoj de novaĵoj kaj opinioj.

La artikolo de Okrent havas 15 paĝojn kaj estas la plej longa el la tri raportoj. La aŭtoro, kiu verkadas libron pri planlingvoj, lernis iom da Esperanto kaj partoprenis la ELNA-Kongreson en 2003 kaj la Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto en Havano (Kubo) en 2004. Ŝi skribas, interalie, pri Kimo Henriksen kaj Esperanta rokmuziko, la historio de la lingvo, la kutimaj publikaj reagoj al Esperanto, kongresaj etosoj, Ivo Lapenna, kaj „Sola”, la kanzono de Amplifiki. Ŝi parolis kun Kimo, Normando Fleury el Montrealo, kaj Humphrey Tonkin. Ŝi skribas el la vidpunkto de iu kiu ĵus eniris

Esperantujon de la ekstera mondo, kaj iom miras, iom dubas pri tio, kion ŝi tie trovis, sed, je la fino, mi pensas ke ŝi miras pli ol ŝi dubas. La artikolo estas bone verkita, interesa, ne tre serioza – la aŭtoro priskribas Kimon Henriksen kiel „way cooler than you’d expect an accordion-playing Esperantist to be” (multe pli ĝismoda ol tio, kion oni atendus de akordiono-ludanta esperantisto”) – kaj, laŭ mi, leginda.

La artikolo « Lingvoj de la mondo, unuiĝu! » en *The Walrus* estas pli mallonga, nur kvar-paĝa. La aŭtoro parolas pri la historio de planlingvoj, kaj pri la historio kaj nuna uzado de Esperanto. Ŝi intervjuis Wally du Temple kaj Mark Fettes, kaj mencias la Kanadan Esperanto-Asocion. Ŝi faras unu-du malgrandajn erarojn (ŝia difino de „krokodili” ne estas tute ĝusta), sed la plejmulto de la artikolo estas preciza kaj favora. Ŝia artikolo estas iomete malpli formala, kun lingvaĵo kaj temoj kiuj eble pli logus junulojn.

La intervjuo de Michael Enright kun Humphrey Tonkin estis tre interesa. Dum la intervjuo, Tonkin – profesoro, aŭtoro, tradukisto, klerulo – prezentis bildon de Esperanto kiel serioza afero, ne kiel ia kuriozaĵo.

Mi trovis ke tiuj tri raportoj kune prezentis pli-malpli precizan kaj favoran bildon de la historio kaj uzado de Esperanto, precipe en Nord-Ameriko. Mi ne scias kial ili ĉiuj venis preskaŭ samtempe – eble raporto de la unua aŭtoro instigis scivolon en la dua, ktp – sed kontentigas min vidi kaj aŭdi tiajn raportojn. Por kelkaj homoj, tiuj raportoj prezentos al ili la mondon de Esperanto, ion novan kaj, espereble, interesan. Por aliaj, la raportoj eble prezentos favoran bildon de io pri kio ili nur aŭdis malfavorajn, malĝustajn onidirojn ĝis nun. Eble, por aliaj, tiuj raportoj faros ion

alian – eble ili estos ŝlosiloj al nova mondo. Kiel lernejo (antaŭ multaj jaroj!), mi aŭdis ie pri Esperanto, kaj la ideo interesis min, sed mi ne trovis pli multajn informojn. Mi neniam pensis ke mi trovus manieron lerni ĝin – sed, jarojn poste, dum universitata studado, mi trovis faldfoliojn pri poŝta kurso

de Esperanto. Tiu faldfolio estis por mi ŝlosilo al nova mondo de amikoj, spertoj, muziko, ideoj, libroj kaj ankoraŭ pli multe, kaj mi daŭre estas dankema ke mi trovis tiun ŝlosilon. Eble unu el tiuj raportoj estos por iu alia ŝlosilo al la mondo de Esperanto.

— Laurinda Matheson

American Scholar – The Walrus – The Sunday Edition – American Scholar – The Walrus – The Sunday Edition – American Scholar – The Walrus – The Sunday Edition – American Scholar – The Walrus

Impresoj pri la 9-a Meksika Landa Kongreso en Aguascalientes

Estis por mi feliĉa hazardo ke la Meksika Esperanto-Federacio (MEF) elektis la datojn de la 1-a ĝis la 5-a de majo 2008 por okazigi sian landan kongreson. Kun mia edzino, mi nome tuj antaŭe finis la dusemajnan latin-amerikan kulturan programon “Internacionalización” en la ne tre malproksima urbego Gvadalaĥaro.

Aguascalientes, eble “la plej bela urbo de Meksiko”, ja estas neriproĉebla pura, taksata kiel delikata respogulaĵo de kolonia pasinteco kun bonsence disvolviĝinta moderna arkitekturo. Kun modera, duonarida klimato, ĝi estas ideala kongres-urbo, laŭ la turismaj reklammaterialoj.

La daŭro de la MEF-a kongreso koincidis kun la vervaj kaj kolorplenaj festotagoj de Sankta Marko, ĉiujare festitaj en ĉi tiu urbo jam ekde la jaro 1604. Inter la tutnaciaj feriotagoj de la Unua kaj la Kvina de Majo ĉi-jare troviĝis ankaŭ semajnfino, pro kio lernejoj kaj ankaŭ multaj laborejoj estis fermitaj dum kvin tagoj, dank’ al kio iuj gestudentoj havis liberan tempon por kongresi.

Estante plejparte eksterurbanoj kaj eksterlandanoj (el 6 landoj), la partoprenantoj de la MEF-kongreso havis ŝancojn sperti la festivalan, karnavalstilan etoson kaj aprezi lokajn vizitindaĵojn iumezure, partoprenante dumkongresajn ekskursojn. Se temas pri

ekskursoj, eĉ post la kongresa fermo, dek personoj ankoraŭ ekskursis al la impona eksterurba pilgrimloko Rompita Kristo.

La kongreso mem procedis facilmove kaj laŭlitere sekvis zorge pripensitajn kaj bone antaŭpreparitajn tagordojn. Mia multjara amiko Vicente Valdés agis kiel ĉef-organizanto kaj li, kune kun teamo de entuziasmaj aktivuloj, meritas multajn laŭdojn pro la unuarange aranĝita programo. Krom la interesaj prelegoj, dancprezentadoj, lingvaj trejnseminarioj, formalaj kaj neformalaj diskutadoj, kantadoj kaj la libroservo, dum ĉi tiu kongreso estis ankaŭ solvitaj kelkaj pasintaj intermalkonsentoj pri la funkcio de MEF.

Per balotado elektiĝis nova estraro. Mallely kaj Morayma Martínez, la du fratinoj kaj miaj karegaj amikinoj, estis elektitaj por la funkcioj de prezidantino kaj kasistino. Por ceteraj estraraj funkcioj estis elektitaj ankaŭ junuloj, nome David López, Daniel Moreno kaj tute ne lastavice la admirinda Martha Cárdenas.

Kiam ni disadiaŭis nin post la fermo de la kongreso, mi restis certa ke meksika esperantismo estas starigita sur solida bazo.

— Milan Sveda

**AGUASCALIENTES
(VARMJ AKVOJ)**

Paul Ronald

Lola Ronald, filino de Paŭlo, telefonis al mi por diri ke la patro mortis en sabata mateno, la 17-an de majo 2008.

Tiu malgaja novaĵo vekis mian memoron, kaj mi por momento revivis multajn agrablajn momentojn kun Paŭlo.

Kiam ni konatiĝis en 1982, li estris la okcidentan klubon de Montrealo kaj foje venis al MEK (Montreala Esperanto-Klubo). Li estis ĝia honora kaj dumviva membro. Li ne maltrafis komunajn vespermanĝojn kaj kulturajn vesperojn okaze de la Zamenhofa tago. Li aktive partoprenis la programon legante *Kalevalon*, aŭ provante ridigi ĉeestantojn rakontante multnombrajn ŝercojn kiujn li konis por ĉiu okazo. Por la Zamenhofa tago, li ĉiam volis aĉeti unu libron por montri ke tiu tago estas samtempe la tago de la Esperanto-libro.

Dum jaroj li kunveturis kun ni al Usono por la aŭtuna renkontiĝo en Ludlow kaj Silver Bay.

Profesie, Paŭlo estis elektra inĝeniero, sed dum libera tempo li ŝatis aŭskulti klasikan muzikon kaj volontuli. Inter pluraj volontulaj respondecoj en la Esperanto-movado de Kanado, menciindas ke li estis : reprezentanto de orienta Kanado en la estraro de KEA (1960), sekretario de KEA (1969), prezidanto de KEA (1972-1976) kaj tiama respondeculo pri la libroservo kaj landa oficejo de KEA en Roxboro.

Mi havis la ŝancon interparoli kun Paŭlo pri lia vivo por la projekto de la libro *Vivprotokoloj*. Lia vivo ekis en Berlino (Germanio), en juda familio. Lia patro decidis savi la familion translokiĝante ĝin al Kaburbo en Suda Afriko. Tie li renkontis Marilou el Svislando. Ili decidis, post la geedziĝo, translokiĝi en Kanadon, al Montrealo.

La dua eldono de *Vivprotokoloj* aperos ĉi somere kaj mi elektis kelkajn frazojn kiujn li diris al mi en la rakonto pri si: « La hejmlando estas elektebla ».

« Kiel studento mi eklernis Esperanton en 1944 kun d-ro Liebeck. Li estis amiko de nia familio kaj tiame la prezidanto de la loka klubo. Mi uzis metodon de Ferenc Szilagy *A Practical Course in Esperanto*. ...Mi rapide lernis... Esperanto kaj ĉiuj Zamenhofaj idealoj ŝajnas al mi plej taŭgaj...Tiutempe la Esperanto-movado estis vere ne forta. La sola klubo estis en Capetown kaj nur kelkaj esperantistoj vivis izolitaj alie en Sud-Afriko. ...Mi tuj fariĝis UEA-delegito. ...Post alveno en Montrealo mi kuraĝigis d-ron Pratley restarigi E-klubon. »

Paŭlo aktivis kun ardeco kaj entuziasmo. « Ĉi tie troviĝis jam aliaj esperantistoj: Jean Forgeau, Reg Archell, Paul Durette. Tiam en Toronto vivis la plej aktiva membro de Kanada Esperanto-Asocio, Dez Hackett, kiun mi same kuraĝigis apogante aktivecojn. Ni sukcesis havi kongreson de KEA en Montrealo en 1959 kiun partoprenis 50 personoj...

Mia edzino ankaŭ lernis Esperanton. Kiel patrino de tri infanoj, ŝi lernis hejme. Tiel ŝi povis multe helpi al mi organizante libro-servon kiu same kiel la centra oficejo de KEA troviĝis ĉe la ĉefa strato en Roxboro. Tio estis inter 1972 kaj 1976 dum mia prezidanteco de KEA. Mia plej aĝa filino lernis Esperanton en lingvo-laboratorio de Duncan Charters kaj Edmund Brent, dum nur unu semajnfino antaŭ la kongreso...

Kiel esperantisto mi aktivis en la skolta movado. Dum la granda Expo de 1967 en Montrealo mi

sukcesis akiri informbudojn por Skolta Esperanto-Ligo. Poste mi faris la samon en Kalgario, en Alberto, en 1984 dum la monda ĵamboreo. ...

Esperanto portis al mi bonajn geamikojn, plilarĝigitan kulturon. Ekzemple, dank' al finnaj esperantistoj kiuj tradukis *Kalevalon*, ni povas kun granda plezuro legi kaj kompreni iliajn legendojn.

En la okcidenta parto de la insulo, la esperantistoj kiuj loĝas proksime fondis Esperanto-klubon sub la nomo Esperanto-Klubo de okcidenta Montrealo.

Pensante pri Esperanto, estas por mi neforgeseblaj la Universalaj Kongresoj en Portland (Oregon), Kopenhago, Rejkjaviko, Vieno kaj Tampere.

Inter miaj aliaj asociaj okupoj mi menciuj la aktivecon por la mondskala homrajta asocio Amnestio Internacia. Renkontinte la nunan ĝeneralan sekretarion Pierre Sané el Senegalio, dum nacia AI-kongreso en Halifakso, mi rekomendis al li uzi E-on, sed li ne konvinkiĝis.

Mi aktivas en la pacmovado kaj al tiu internacia movado mi proponis E-on, sed sen sukceso.

Mi estas kanadano kaj mi provas subteni Kanadon en Kebekio.

Kanado estas mia nuna hejmlando same kiel antaŭe estis Sud-Afriko, kaj pli antaŭe Germanio. Transmigrante mi lernis ke la hejmlando povas esti tiu kiun oni elektas kaj ke neniu lando havas monopolon pri beleco aŭ kulturo... »

Preta ĉiam kiel skolto, malfermita al la mondo kaj pacema kiel vera esperantisto; aktiva dum la sano tion permesis, Paŭlo aktivis kun ardeco kaj entuziasmo.

Ni povus nur diri : DANKON, Paŭlo, por ĉio kion vi faris .

— Zdravka Metz

Paul Ronald dum MeKaRo en Toronto, majo 2005
(fotis P. Hopkins)



Kanadaj Zamenhof-festoj 2007

Kalgario

Esperantistoj de la (daŭre vigla) Kalgaria Esperanto-Rondo kaj de la (intertempe ĉesinta funkcii) Kalgaria Esperanto-Centro kunvenis sabaton, la 15-an de decembro, en la hejmo de Paŭlo kaj Maria Hopkins por festi okaze de la



naskiĝ-datreveno de LLZ. Krom babilado en diversaj lingvoj (spertaj esperantistoj Esperante, lernantoj kaj simpatiantoj angle), manĝetado, kaj trinketo, ni ĝuis la komunan kantadon de kantoj Zamenhof-tagaj kaj kristnasko-festaj.

Toronto

(el *La Torontano* n-ro 81, vintro 2007)
La Zamenhofa Festo okazis dimanĉon, kaj do devis finiĝi je pli frua horo ol en antaŭaj jaroj, ĉar multaj membroj devis labori lundon. Tio eble influis al eksterurbanoj ne veni, sed kio vere malutilis estis ŝtormo. Dudek ses centimetroj da neĝo falis en Toronto dum tiu tago, kaj ventoblovo kreis vid-problemojn kiuj, kun la glita surfaco, danĝerigis veturadon sur ŝoseoj.



Unu eksterurbano, nia bona amiko Vernero el Tonawanda (Bufalo), ĉeestis. Li alveturis la antaŭan tagon kaj iris hejmen lundon! Ni havis la plezuron bonvenigi alian gaston, Mark, el eĉ pli fora loko (Brazilo), kiu lastatempe loĝis en Meksiko kaj venis al Toronto por unu-semajna vizito. Estas bona novaĵo por ni ke Mark intencas reveni je la mezo de marto, por pli longa restado.

— Ken Price

Universala Kongreso en Florenco

Raporto de unuafoja kongresinto

(el *Inter Ni* n-ro 246, oktobro 2006)

[Raporto pri kongreso okazinta antaŭ 23 monatoj eble ne estas novaĵo, sed estas ĉiam interese legi raporton de unuafoja partopreninto de UK... kaj ankoraŭ ne aperis raporto pri tiu ĉi grava kultur-evento sur la paĝoj de nia revuo. Kanadanoj partoprenintaj la Jokohaman UK-on (kaj partoprenontoj de la Roterdama UK), estos bonvenaj raportu pri siaj spertoj! (psh)]

La 91-a Universala Kongreso en la bela Toskana urbego estis la okazo de mia unua vojaĝo al Eŭropo. La angla, mia denaska lingvo, estas ĝermana lingvo. Esperanto havas multajn latin-devenajn vortojn, kiel la itala. Dekomence, en la flughaveno en Romo, Esperanto helpis min legi la ŝildojn. Esperanto ne certigas la komprenon de la itala, sed ĝi estas paŝo en tiu direkto. Mi komprenis la akĉentojn de ĉiuj ĉe la kunvenoj. Antaŭe, mi nur duone kredis ke la parolata lingvo funkcias tiel bone. Mi ne tute komprenis la komputilan faklingvon (same kiel en la angla). Kelkaj kulturaj aludoj estis strangaj al mi, kaj kelkaj el la ideoj estis eĉ pli strangaj. Ŝajnas al mi, ke post kiam oni atingas meznivelan lingvo-kapablon en Esperanto, oni povas sufiĉe bone funkcii. Nur la aliaj individuaj diferencoj nebuligas niajn personajn ligojn.

La konferenco kaj preskaŭ ĉiuj kunvenoj estis nepublikaj. Mi ne certas pri kiu oni timis. Laŭ mia sperto, niaj malamikoj atakas kun moko, ne bomboj – eble nuntempe sekureco necesas por ĉiuj, ĉie. Multaj el la fakaj kunvenoj okazis samtempe. Do, post mia elekto inter du grupoj, mi ĉeestis dum nur 10 minutoj kaj eksciis ke tiu afero ne vere interesas min. Ekzemple, la unua kunsido de la ateistoj koncernis funkciulajn voĉdonojn, monon kaj aliajn organizajn aferojn. Mi ne estas ano de

tiu grupo kaj ne intencas aliĝi. Do mi foriris de tiu ĉambro kaj iris al prelego pri la Renesanco. Tio estis malĝentila – interrompi per transiro al la pordo de la unua kunveno, kaj eniro por trovi seĝon en la alia. Mia senkulpiĝo estas ke multaj aliaj faris same, kaj mi deziris partopreni en ĉia riĉeco tie. La dua ateista kunveno traktis la sendian vivon kaj ideojn, kaj tio estis multe pli interesa. La kongresanoj estis plejparte maljunuloj; malgranda grupo de dudek-kelk-jaruloj estis tie, kaj preskaŭ neniu en siaj 30-aj aŭ 40-aj jaroj. Ofte, iu blank-harulo el la aŭskultantaro interrompis kunvenon per pasia parolado. Esperantistoj, aparte la maljunuloj, estas pasiaj pri ideoj – eĉ pri etaj gramatikaj ideoj.

Mi spektis la statuon de Davido en la centro de Florenco. Mi preskaŭ ne povis kredi ke tio estis farita nur per la okuloj kaj la manaj iloj. La haŭto kun vejnoj – belega. Ĉiuj, kiujn mi renkontis kiuj jam vojaĝis en Eŭropo, diris ke norda Italio estas la plej bela, plej ĝuebla parto de Eŭropo. Mi ne vidis la aliajn eŭropajn landojn, sed Toskanio estas vere bela – precipe la pano. Se la UK estos en urbo plena de la artaĵoj de jarmiloj, mi irus denove malgraŭ tio, ke la elspezo ja estus troa por mi.

La loĝantoj de Florenco nomas sian urbon „Firenze.” Mi ne komprenas kial ĝi ne nomiĝas Firenzo en Esperanto. Ĉu tio estas elekto de la historia, latina nomo? Mi min demandas: ĉu aliaj geografiaj nomoj venas de la historio anstataŭ la nuntempo? Antaŭe mi opiniis ke la Esperantaj nomoj de urboj estis Esperantaj variaĵoj de la nomoj en la lokaj lingvoj. Ĉu tio estas nur portempa regulo?

— Reni Porter



La *Unua Libro* en dua jarcento

(el *Inter Ni* n-ro 257, septembro 2007)

Antaŭ kelkaj jaroj mi rimarkis konfuzite ke la *Unua Libro* de Zamenhof estis delonge elĉerpita, eĉ en Esperantujo. La *Unua Libro* ne estis libro, sed 40-paĝa broŝuro en unu el kvin lingvoj – la rusa, pola, franca, germana (ĉiuj eldonitaj en 1887) kaj, poste, la angla (1889). Tiel debutis la *Internacia Lingvo de D-ro Esperanto*.

Bonŝance en 1993 mi povis legi fotokopion de ĝi en la Libraro Ludovika de Steĉjo Norvell, kaj poste en dika volumo de la ludovikologia dokumentaro. Sed la verko mem ankoraŭ restis neaĉetebla. Tial mi decidis re-eldoni la anglan version.

Je 2000 mi aperigis la novan eldonon, en nur cent ekzempleroj. Precipe vendita de la Esperanta Ligo por Norda Ameriko (nun konata kiel Esperanto-USA), ili elĉerpiĝis dum 2006. Mia amikino Mariĵo instigis min aperigi ĝin ankaŭ en la interreto. Kun ŝia helpo koncerne la HTML-kodigadon, mi aperigis la libreton *Dr. Esperanto's International Language* en mia retloko en decembro de 2006 por „Ago-Tago”. Ŝi ankaŭ instigis kaj helpis min fari represon de la papera versio. Tiuj 100 ĝisdatigitaj ekzempleroj aperis en februaro de 2007.

Ho, Doktoro, jen la Dua Jarmilo. Via papera broŝuro ja vendiĝas, laŭgrade kaj malmulte. Semante senplende. Sed rigardu la etendiĝon de la Reto. Tie, la *Unua Libro* atingis post nur ok monatoj legantaron de pli ol mil, dekoblo

de mia unua represo.

Kiel mi scias? Posedanto de retloko povas uzi senpagan servon kiel StatCounter.com por nombri la vizitantojn al siaj paĝoj. Kaj ne nur nombri, sed ankaŭ montri ties deven-landojn, kaj daŭron de vizitoj, kaj eĉ mondomapon kun pingloj. Kompreneble, multaj vizitantoj nur ekrigardas, ne tralegas. Sed kiaj diversaj devenoj! La nuna listo ĉe „StatCounter” havas 26 landojn, kaj tiuj estas nur de la lastaj cent vizitintoj.

Tio ne estas ĉio. David Simpson ret-eldonis la *Dua-n Libro-n* de Zamenhof, uzante la saman formaton kiel mi. Nicholas Bridgewater el Britio ankaŭ kontaktis min petante ke li rajtu fari laŭtleĝatan version de la *Unua Libro* por senpaga MP3-a aŭskultado (*LibriVox.org*). Kial ne? Li tuj faris tion. *Dr. Esperanto's International Language* do nun aŭdeblas ĉe LibriVox.

La komputila nombrilo ankaŭ montras la ligilojn per kiuj la vizitantoj alvenas. Ĉar mi metis kelkajn ligilojn en Vikipedio, multaj alvenas de tie. Multaj ankaŭ alvenas de LibriVox, multaj de la retejo de Esperanto-USA, kaj multaj de la „librejo” de David Simpson (esperanto.davidgsimpson.com).

Do, mi fiere starigas kaj daŭrigas la *Unua-n Libro-n* en la dua jarmilo. Jes, la kvanto restas mikroskopa, sed la rezultoj restas plenesperaj. Ni semu kaj semu.

— Gene Keyes

La leono kaj la kokino

(el *Inter Ni* n-ro 249, januaro 2007)

Leono kaj kokino renkontiĝas.

La leono diras, „Se mi blekegas en la ĝangalo, la tuta ĝangalo timas min.”

La kokino diras, „Tio estas nenio. Se mi nur tusas, la tuta planedo freneziĝas pro teruro.”

(ŝlosilo : se homo tusas, tio povus esti pro **gripo**...)

Testu vian vortostokon

(el *Inter Ni* n-ro 242, junio 2006)

- floso** a) kunaĵo de arbotrunkoj por transporti en rivero
 b) ĉiuj ŝipoj de regno, militŝiparo sub komando de admiralo
 c) forta fadeno por purigi la dentojn
 ĉ) lavado per abundo da akvo
- impliki** a) logike enteni, enhavi en si ion ne formale esprimatan
 b) kunigi plurajn fadenformajn objektojn, interkrucigante ilin
 c) malfaciligi aŭ malhelpi la movojn de io aŭ iu
 ĉ) atribui sumon al iu konto
- drivi** a) veturigi ĉevalon aŭ automobilon
 b) forte instigi iun fari ion, frenezigi
 c) flosi laŭ la puŝo de akvofluo aŭ vento
 ĉ) instrui beston por iu celo
- vulgara** a) ĝenerala, ordinare uzata
 b) malkonforma al la regantaj moroj
 c) triviala
 ĉ) konforma al la latina traduko de la sankta Biblio
- limako** a) kvinlinia ŝerca poemeto
 b) citrusa arbo aŭ ties frukto
 c) senkonka surtera molusko
 ĉ) flava aŭ senkolora likvo cirkulanta en vaskuloj
- primolo** a) plurjara herbo kun koloraj floroj
 b) honora titolo de ĉefepiskopo en kelkaj landoj
 c) malgranda kuirforno bruliganta vaporigitan petrolon
 ĉ) misforma, infekta proteino
- ĉerpi** a) eligi akran sonon, kiel faras iuj insektoj
 b) elpreni likvon per la mano aŭ ilo
 c) transskribi per sekreta interkonsentita skribosignaro
 ĉ) difekti ion, kunpremante kaj farante multajn senordajn faldojn

Vi trovos la solvojn de la testo ĉe paĝo 16.

Malfrua ĉe la laborejo

(el *Inter Ni* n-ro 252, aprilo 2007)

Li ŝajne ne kapablis ĝustatempe alveni ĉe la laborejo. Ĉiun tagon li alvenis eble kvin, eble dek minutojn malfrue. Li estis tre konscienca, tre lerta kaj tre produktema. Estis la dua kariero por tiu homo, kaj pro tio la laborestro maltrankviliĝis pri tio, kion li devas fari. Finfine li decidis ke li devas alparoli la viron kaj invitis lin en sian oficejon por kunveneto. „Arnoldo, mi devas diri al vi ke mi ŝatas vian diligentecon, sed via malfrueco ofte ĝenas.” „Jes, estro, mi konscias pri tio, kaj mi traktadas tion.” „Nu, bone. Tion mi ŝatas aŭdi. Tamen, estas iom strange ke vi alvenas malfrue. Mi scias ke vi jam emeritiĝis de la Mararmeo. Kion oni diris, se vi alvenis malfrue tie?” „Ili diris « **Bonan matenon, ĈEFO** ».”

Ubuntu

(el *Inter Ni* n-ro 253, majo 2007)

Ubuntu estas zulusa vorto kiu signifas, ke la homaro estas tute interligita. Mark Shuttleworth kaj lia manksa kompanio, Canonical Ltd., kreis ĉi tiun facile uzeblan kaj fidindan programaron surbaze de antaŭa linuksa* programaro, Debian. Ubuntu nun havas Viki-on kaj komunumon por regi kaj evoluigi sin. Canonical opinias ke ĝi gajnos profiton el tiu senpaga programaro. Mi tute ne komprenas kiel, sed ili jam kaptis min pro la magia vorto „senpaga“. Dell, granda komputila kompanio, decidis komenci ĉi-somere vendi personajn komputilojn kun Ubuntu kiel mastruma sistemo.

Ubuntu 7.04 (jaro kaj monato) estas linuksa sistemo kiu havas esperantlingvan „vizaĝon“... plejparte. Ne ĉio estas tradukita ĝis nun. Dum la tajpado de ĉi tiu artikolo, mi rigardas la supron de la ekrano kaj vidas „mer Maj 02“. Bona afero, por vivi esperantlingve, kaj tion mi ŝatas fari. La Esperanta vizaĝo de mia komputilo multe helpas.

Mia vortprocesilo estas la ankaŭ publike kodigita OpenOffice. En tiu programaro estas Esperanta vortaro kaj ĝi uzas la Ubuntu-an esperantlingvan klavaron. Kiam mi tajpas „mer“, la programo surekranigas „merkredo“-n kiel sugeston. Eble mi ne uzas

tiun sugeston, sed plaĉas al mi, ke mia komputilo babilas esperantlingve kun mi.

Google, la plej uzata serĉilo, jam dum la pasintaj du aŭ tri jaroj havas Esperantan vizaĝon. Do, oni povas pli kaj pli komputilumi esperantlingve.

„La estonteco jam estas ĉi tie, sed la distribuado estas malegala.“ (anglalingve: *The future is already here, it is just unevenly distributed.*) – William Gibson.

La ĉefaj programoj uzataj de mi kiuj bezonas esperantigon, estas la krozilo Firefox kaj la retpoŝta legilo Thunderbird. Ambaŭ havas multajn lingvojn sed (ankoraŭ) ne Esperanton.

Partoj de la komputila mondo iom post iom iĝos pli malfermaj, pli demokrataj, malpli usonaj, malpli anglalingvaj, kaj bonŝance pli esperantlingvaj. Per Vikipedio (la reta komunuma kunlaborejo), per retaj babilejoj, per blogoj, per retpoŝto, per paĝaroj kiel <eo.lernu.net>, perfekta landeto en kibernetikejo estas konstruebla. Mia perfekta kibernetik-landeto estos demokrata, malferma, malkomerca kaj... Esperanta.

— Reni Porter

* Linukso estas unu komputila mastruma sistemo. Vindozo estas alia tia sistemo.

Solvoj de la enigmo « Testu vian vortostokon » sur paĝo 15 :

floso estas kunaĵo de arbotrunkoj por transporti en rivero (a)

impliki signifas: malfaciligi aŭ malhelpi la movojn de io aŭ iu (c)

drivi signifas: flosi laŭ la puŝo de akvofluo aŭ vento (c)

vulgara signifas: ĝenerala, ordinare uzata (a)

limako estas senkonka surtera molusko (c)

primolo estas plurjara herbo kun koloraj floroj (a)

ĉerpi signifas: elpreni likvon per la mano aŭ ilo (b)

Google nun serĉas Esperante

(el *La Riverego* n-ro 90, decembro 2007)

Ĉu vi rekonas la vortojn « kaj estas », eble « kaj la estas »? Jes, ilin oni uzis en serĉiloj kiel Google aŭ Yahoo kiel aldonon al la efektive serĉata esprimo, por elfiltri el la tuta reto nur la esperantlingvajn paĝojn kaj en tiuj serĉi.

Ekde kelkaj monatoj tamen, tiaj vortoj ne plu estas necesaj, ĉar Google decidis komplezi la Esperanto-komunumon, aldonante Esperanton kiel unu el la lingvoj laŭ kiuj eblas filtrigi la rezultojn de serĉo. Atentu ke ne temas pri la ebleco vidi la retpaĝaron de Google en Esperanto! Tio eblas jam de longa tempo kaj da tiaj lingvoj estas pli ol cent.

La nova decido de Google envicigas

Esperanton inter nur 43 lingvojn, al kiuj eblas limigi la rezultojn de efektivigata serĉo. Tial la robotoj de Google nun trairante la reton aŭtomate rekonas retpaĝojn skribitajn en Esperanto kaj dum serĉado ebligas al la uzanto serĉi nur ene de ili. Saman pozicion kiel nun Esperanto ankoraŭ ne havas en Google tiom grandaj lingvoj kiel la hinda, la bengala, la latina, la afrikansa, aŭ la svahila. Cetere, Esperanto estas la sola artefarita lingvo tiel agnoskita.

Por serĉi per Google nur esperantlingvajn paĝojn, uzu la adreson: www.google.com/intl/eo/ kaj hoku « **serĉu paĝojn pri Esperanto** ».

— Marek Blahus

Wikipedio : Volapük superas Esperanton, ĉu?

(el *La Riverego* n-ro 90, decembro 2007)

Lastatempe, ni eksciis kun konsterno ke Esperanto falis al la 19-a* loko, laŭ nombro de artikoloj, en la listo de lingvoj en la reta multverkista enciklopedio Wikipedio. Tio ne estus plej alarmiga, se oni ne vidus, ke Volapük estas en la 15-a* loko, en la malgranda grupo de lingvoj kun pli ol 100.000** artikoloj. (Kontrolu mem ĉe http://meta.wikimedia.org/wiki/Complete_list_of_language_Wikipedias_available)

Tamen, kvankam aldonon de kvalitaj artikoloj estas tute bonvena kaj donus pli belan reklamon al Esperanto, ni eble ne tro zorgu pri tio. Mi iris esplori la volapukan artikolaron, kaj trovis *nur* mallongajn klarigojn pri loknomoj, tradukitaj, eble maŝine, el aliaj lingvoj, kaj el *nur* kelkaj landoj (Usono, Francio, Brazilo, Germanio, Aŭstrio, Svisio, Estonio kaj unu de Kanado).

Ni memoru, ke Volapuko estas projekto de internacia lingvo naskita naŭ jarojn antaŭ Esperanto kaj fiaskinta pro lingvistikaj — ĝi estis apenaŭ lernebla, eĉ de ĝia kreinto — kaj intern-politikaj problemoj.

— Sylvain Auclair

* Je la fino de junio (2008) Esperanto estis en la 21-a loko, kaj Vokapuko en la 16-a loko.

** La 15-an de junio (2008) aperis en la Esperanta Wikipedio la centmila artikolo, pri **monfalsado**. Ĝis la fino de junio aperis pliaj 660 artikoloj, tiel ke nun la Wikipedio havas pli ol **100 660** artikolojn.



WIKIPEDIO
La libera enciklopedio

Tri eraroj en la Membrolisto de KEA 2008

La sekretario informiĝis pri 3 eraroj en la Membrolisto dissendita antaŭ kelkaj monatoj. La ĝusta ret-adreso de **Paul Hopkins** estas **hoppaulXX@XXgmail.com** kaj tiu de **Jean Smythe** estas **jessmytheXX@XXshaw.ca** (forigu X'ojn). En la Membrolisto aperas dufoje la nomo **Jacqueline Sveda** : la dua devus esti **Milan Sveda**.

Klaku.net : valora aldono al la Esperanta retejaro

(el *La Riverego* n-ro 90, decembro 2007)

Klaku.net estas Esperanta sociiga retprojekto, kiu ebligas al homoj publikigi ĉe unu centra retejo plej diversajn Esperantajn artikolojn aperintaj ie ajn en la reto. Uzantoj povas ankaŭ voĉdoni (alklakante, tio estas, per muspremo) kaj komenti pri la kontribuajoj, kiujn ili opinias aparte gravaj aŭ interesaj.

La projekto, inspirita de la anglalingva *digg.com* kaj la hispanlingva *meneame.net*, estas aparte taŭga por la Esperanta retejaro: (el la retejo de Klaku) « Ĝis nun, la esperanta blogaro ne estis rete interkonektita. Klaku celas esti la deirpunkto el kie la reta engaĝiĝo povas kreski, [...] Klaku estas la projekto por teksti esperantan disan reton. »

Bonvole vizitu www.klaku.net kaj... Ek al klak' !

— Boris-Antoine Legault

Mi estas neniu

(el *Inter Ni* n-ro 247, novembro 2006)

I'm nobody! Who are you?

Are you nobody, too?

Then there's a pair of us – don't tell!

They'd banish us, you know.

How dreary to be somebody!

How public, like a frog

To tell your name the livelong day

To an admiring bog!

Mi estas neniu. Kaj kio pri vi?

Ĉu vi neniuas simile al mi?

Do, ni duopas – kaŝiĝu la ver'!

Ni ekziliĝus aliloken sur ter'.

Kiom morne, esti gravularan'!

Kiom publike, pensige pri ran',

Tagon post tago la nomon gurdante

Ripete, senĉese al marĉ' admiranta!

— Emily Dickinson

usona poetino (1830-86)

el *Complete Poems*, 1924

— tradukis Steĉjo Norvell

Redaktora angulo

Pasis nur kvin monatoj post la apero de la numero 2007/2 de *Lumo*, kiun bonvolis gastredakti Normand Fleury, kaj jen la sekva numero, la unua por 2008. Ni antaŭvidas ke la dua numero de 2008 aperos aŭtune, tiel ke aperos tri numeroj ĉi-jare. Ni antaŭvidas ke grandan parton de la sekva numero okupos raportoj pri TAKE 7, sed ankaŭ estos loko por raportoj pri aliaj Esperanto-eventoj (UK Jokohamo, UK Roterdamo, ARE, NOREK, ktp), pensigaj artikoloj, poemoj, kaj simile.

Sendi viajn kontribuojn al :

Paul Hopkins < hoppaulXX@XXgmail.com > (forigu X'ojn)

#55 - 9520 Bonaventure Drive SE, Calgary, AB T2J 0E5





Ĉiunonate raportas pri politiko, scienco,
moderna vivo, ekonomio kaj multe pli.

Ne pri Esperanto sed en Esperanto!

Petu senpagan provkzempleron de MONATO
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: admin@monato.net

Aere \$ 78 Surface \$ 73 Rete \$ 43.80



La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Eventoj: Artikoloj, informoj, intervjuoj pri Esperanto
Tribuno: Malkaŝaj opinioj pri diversaj temoj
Vide el Bruselo: Lingvopolitika rubriko de Dafydd ab Iago
Vortoj de Komitatano Z: Unika primovada rubriko
Beletro: Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
Civilizo: Kia estis, estas kaj estos nia mondo
Arkivo: Historio de Esperanto sub lupeo
Nia Trezoro: La plej gravaj libroj en Esperanto
Kore kaj roke: Muzika rubriko de Flor

Simpla abono por 2008: \$ 47

Aerpoŝta aldono: \$ 7

Elektronika abono (PDF): \$ 18

Podkasta servo: senpage



Por aboni al **Monato** aŭ **La Ondo de Esperanto**, sendu ĉekon, kun la necesaj informoj, al
Kanada Esperanto-Asocio
p/a Yves Bellefeuille, kasisto
2372 Haddington
Ottawa Ontario K1H 8J4

Kalendaro

Regulaj kunvenoj:

Halifakso (Nov-Skotio): Oni kunvenas proksimume dufoje ĉiun monaton ĉe la hejmoj de grupanoj. Pliaj informoj ĉe <http://www.esperanto.ca/eo/halifax>

Kalgario (Alberto): la Kalgaria Esperanto-Rondo kunvenas ĉiun lundan vesperon inter la 19h00 kaj 21h00 ĉe la kafejo Second Cup en distrikto Kensington (338 - 10a Strato NOk). Pliaj informoj ĉe <http://esperantocalgary.blogspot.com/>

Montrealo (Kebekio): la lastan vendredon de ĉiu monato (krom julio, aŭgusto kaj decembro) okazas Amika Vespero de ESK en MEDO (Montreala Esperanta Domo, 6358-A Bordeaux). La tempo inter 19h00 kaj 20h00 estas rezervita por komencantoj kaj de 20h00 ĝis 22h00 por diskutado. Pliaj informoj ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites>

Toronto (Ontario): Oni kunvenas ĉiun lundan vesperon ĉe kafejo Timothy's World Coffee ĉe stratoj College kaj Bay inter la 18h00 kaj 20h00. (Escepto: kiam lundo estas feritago la kunveno okazas mardon.) Pliaj informoj ĉe <http://www.esperanto.ca/eo/toronto>

Viktorio (Brita Kolumbio): Kunvenoj okazas en North Saanich ĉiun lundon de la 12h00 ĝis 14h00 en la domo de Olga kaj Wally du Temple kaj ĉiun ĵaŭdon de 13h00 ĝis 15h00 ĉe Golfludejo Ardmore. Pliaj informoj ĉe <http://esperanto.ca/victoria/>

Laŭokazaj kunvenoj (de julio 2008):

7-a ĝis 10-a de julio

Tri-Rivero, Kebeko, Drumondvilo (Kebekio) kaj **Otavo** (Ontario): Antaŭkongreso de la 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto. Informoj esperantolingvaj ĉe <http://www.take7.ca/antauxpostkongreso.html>

11-a ĝis 18-a de julio

Montrealo (Kebekio) : 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto kun jarkunvenoj de Kanada Esperanto-Asocio kaj la 56-a Nacia Kongreso de Esperanto-USA (ELNA). Informoj ĉe <http://www.take7.ca/enkonduko-eo.html>

19-a ĝis 20-a de julio

Otavo (Ontario) : Postkongreso de la 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto. Informoj ĉe <http://www.take7.ca/antauxpostkongreso.html>

19-a ĝis 26-a de julio

Roterdamo (Nederlando) : 93-a Universala Kongreso de Esperanto. Pliaj informoj ĉe http://www.uea.org/kongresoj/uk_2008.html

26-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto

Szombathely (Hungario) : Internacia Junulara Kongreso (de TEJO). Pliaj informoj ĉe <http://esperanto.net/ijk2008/>

11-a ĝis 13-a de oktobro

Silver Bay (Novjorkio): 15-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto. Pliaj informoj ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/are>